

TRIMESTRIEL
N° 133 -

JUIN 1982 -
junio 1982-

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
trimonata bulteno. (Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 LE PERREUX-sur-MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT B. P. 54 49150 BAUGE
Peranto: IKUE: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE
C.C.P. Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.

==== la n°: 4 F. Abono: 15 F. Kotizo: 5 F. Sume: 20 F. =====

+++++

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la
10-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

+++++

BILETO DE LA PREZIDANTO

Peut-on parler de Paix quand on entend chaque jour des communiqués de guerre, quand on a vu se déclencher, après les combats et les attentats du Proche-Orient, après les conflits musulmans et l'impardonnable guerre d'Afghanistan, une impitoyable guerre marine qui jette les uns contre les autres les immenses vaisseaux de deux puissances qui risquent la vie de plus d'hommes qu'elles n'en prétendent défendre.

Ces forces tenues en réserve, perfectionnées dans la possibilité de donner la mort, soi-disant dissuasives à l'égard d'un agresseur éventuel, il suffit d'une étincelle pour qu'elles se mettent en route, prêtes à semer les deuils et la ruine!

Que pouvons-nous opposer à cette remise en question, sous le couvert d'intérêts illusoires, de l'aspiration profonde de chacun à vivre paisiblement sa vie? Oui, nous qui sommes attachés à la recherche de cette Paix qui nous paraît le bien suprême des peuples, nous devons militer, par nos actes, en faveur des efforts qui sont faits pour que se réalise un jour ce vœu "Plus jamais la guerre"

Notre congrès de Nancy, le congrès international de IKUE à Lille en juillet, tout particulièrement orientés vers cet objectif, veulent mettre en évidence le rôle que le mouvement espérantiste peut jouer dans le rapprochement des peuples, base nécessaire de la réduction des méfiances et des craintes qui mettent les uns et les autres sur la défensive armée.

Les relations entre pays sont pour une grande part basées sur les intérêts matériels: économie, finances, commerce, industrie, pour la sauvegarde égoïste d'un certain niveau de confort, fût-ce aux dépens des plus faibles. Aussi, qu'en est-il de la proposition généreuse du Président Mitterrand à l'Europe, de la création d'un "espace social"? Ce ne pourrait se faire que dans un véritable respect de l'homme (individuel et collectif) dans toute sa dimension spirituelle et culturelle, dans l'exclusion de tout sectarisme, l'épanouissement dans le pluralisme de toutes les libertés, la circulation sans entrave des idées.

C'est justement, dans le milieu espérantiste, l'état d'esprit qui se manifeste en actes, par les rapports qu'il établit de pays à pays, entre hommes et groupes d'hommes. Ces rapports, sur les divers plans où ils se situent,

LINGVA ANGULO

La esprimojn proponitajn en la n^o 132 tradukis 5 legantoj: S-roj BOURGOIS (B), CHAMBAZ (C), DAUCHEZ (Da), DÉGOUL (De) kaj S-ino MICHAU (M).

S-ro Chambaz, ne membro de FKEA, ne rajtas partopreni la konkurson, sed ni bonvenigas liajn tradukojn kaj dankas lin pro liaj klopodoj; eble lia ekzemplo stimulos aliajn!

1) c' est un coup de poignard dans le dos: insida perfidaĵo, judasaĵo (B); venĝa gesto (C); perfida kvazaŭ ponarda bato en la dorson (Da); tio estas ponaĝi la dorson (De); perfida atako (M).

2) faire des débuts fracassants: glorie debuti, tuj famiĝi (B); ekrapidigi sukceson (C); sin konigi per rapida sukceso (Da); eki famege (De); eksplode ekfamiĝi (M).

3) il a décroché la timbale: li brile sukcesis (B); li gajnis dank' al bonŝanco (C); li trafis la celon (Da); li tute trafis (De); li lerte (aŭ bonŝance) celtrafis (M).

4) il reste sur ses positions: lia starpunkto restas la sama, li firme staras ĉe la sama sinteno (B); post pripenso li konservas sian opinion (C); li ne modifas sian opinion, jam diritan (Da); li neniel ŝanĝas sian opinion (De); li firme tenas siajn principojn (M).

5) se draper dans sa dignité: dignece paradi (B); iom fanfaroni (C); rifuzi kun indigna (Da); elmontri sian dignecon (De); fiere prezervi dignon (M).

6) faire un effet boeuf: sensacii (B); produkti sensacion (C); mirigi (Da); fulmotondre efiki (De); sensacie impresi (M).

7) emboucher les mêmes trompettes: samargumenti, kunludi la saman arion (B); kopii la samajn objektojn (C); ripeti ies diraĵon (Da); sammuziki (De); ripeti samajn argumentojn (M).

8) c' est entré dans les moeurs: ĝi iĝis kutimaĵo (B); ĝi estas pli ol kutimo (C); tio fariĝis nova kutimo (Da); al tio moroj alkutimiĝis (De); tio iĝis akceptita (aŭ tolerita) moro (M).

9) je n' en ai rien à faire: tio tute ne tuŝas min (B); kun mokado forlasi (C); mi rifuzas viajn proponojn, neniel! (Da); tio mi neniel prizorgas (De); tio, ~~xxxx~~ neniel povas al mi utili (M).

10) il est frit: li estas nepre perdita (B); li ne plu povas sin defendi (C); li estas venkita, li ne plu povas esperi (Da); li nesaveblas (De); li plene malsukcesis (M).

Dua klasifiko: 1) S-ino MICHAU (10); 2) S-ro BOURGOIS (9); 3) S-ro DEGOUL (5); 4) S-ro DAUCHEZ (1).

Gratulojn al ĉiuj! Estas ankoraŭ tempo eniri la rondon...

Novaj tradukotaj esprimoj proponitaj de S-ro Bourgois:

- 1) il ne ferait pas bon s' y frotter;
- 2) fuir ses responsabilités;
- 3) il peut toujours se fouiller;
- 4) il faut faire gaffe;
- 5) gagner de l' argent à la pelle;
- 6) un gagne-petit;
- 7) il a gagné haut la main;
- 8) il a gagné le cocotier;
- 9) gagner son paradis;
- 10) ce n' est pas de gaieté de coeur.

+++++

AL LA PERFEKTIGEMULOJ: NOVA PROPONO

Certe inter niaj legantoj kaŝiĝas homoj iom izolitaj, kiuj ne havas eblecon renkonti alilandanojn, tre malofte povas praktiki Esperanton kaj sekve progresi en ĝi. La korespondado ne ĉiam helpas, ĉar okazas, ke la malproksima plumamiko, aŭ estas komencanto - vera aŭ ne vera! - aŭ tute bonintence fuŝas la lingvon! Kiel progresi? Eblas ja legi bonajn aŭtorojn, ili ne malmultas. Sed mi volas proponi alian rimedon, nome tradukrondon. Unu tradukota teksto rondiros inter maksimume 6 aĵoj; ĉiu tradukos ĝin (de la franca al Esperanto) kaj povos ne nur ricevi la korrektadon, sed kompari sian propran tradukon kun la aliaj.

La interesuloj skribu al S-ino Vincent (v. p. 1), kiu kunordigos la aferon. Se pli ol 6 sin aĵoncos, oni formas duan rondon k.t.p.

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNSIDO DE LA 14-a DE MARTO 1982 EN PARIS

Ĉeestas: P. Bourdon, F. Marmou, S-ino Vincent, F-ino Preux, S-roj Colas, Despiney kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: P. Degrelle, S-ino Michau, S-ro Bessière.

La kunsido komenciĝas je la 14.30 per la kanto: Mi serĉas la vizaĝon. Ni aprobas la tagordon kaj raporton de la lasta kunsido.

FKEA-kongreso: en Nancy je Pasko. Oni petas, ke la diservoj estu pli zorgem preparitaj. Pluraj revuoj anoncis la kongreson.

IKUE-kongreso: en Lille de la 17-a ĝis la 23-a de julio. Samtempe okazos la unua IKEK-kongreseto. Ĉeftemo: PACO; okazos prelegoj, kunsidoj de la IKUE-komitato kaj membroj.

Rilatoj FKEA-IKUE: oni bedaŭras, ke la komitatanoj de IKUE ne konas unu la alian; estus tre dezirinde, ke ĉiuj partoprenu la kongreson, kie ili povus interkonatiĝi. Ankaŭ ĉiuj anoj havas respondecon en la asocio. Ili agu!

UFE-kongreso: en Orléans je Pentekosto. P. Bourdon diservos dimanĉon 30-an.

Kultura agado: la bazo estas la instruado de la lingvo. Se la partoprenantoj en la lingva angulo ne iĝos pli multaj, oni ĉesigos tiun rubrikon. (v. p. 3)

Bulteno: Iu diras, ke aperas tro da poemoj. Oni kritikas la seriozecon de la artikoloj senditaj de Radio-Roma.

Diversaĵoj: pilgrimo en Banneux la 12-an de septembro.

FKEA-kongreso 83 en Lourdes de la 5-a ĝis la 12-a de aprilo ĉe la "Religiuloj de l' Ĉieliro".

Kunuloj de S-ta Francisko: internacia pilgrimado en Belgujo en 83 kun kelkaj kunuloj esperantistaj.

Tombo de P. Peltier: P. Bourdon ricevis leteron el Lourdes pri tio kaj skribos al la heredintoj.

"L' Esperanto au service du Christ": tiu libreto ne plu taŭgas, tro malnova.

La kunsido finiĝas je la 17.00 per la kanto: Vi, venka, regos".

* * *

PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNSIDO DE LA 11-a DE APRILO EN NANCY

Ĉeestas: P. Degrelle, S-ino Vincent, F-ino Preux, S-roj Colas, Despiney, Lecocq kaj Villeneuve.

Petis senkulpigon: P. Bourdon, F-to Marmou, S-ino Michau, S-ro Bessière.

Ĉiuj reelekteblaj komitatanoj estas reelektitaj. S-ro Lecocq eniras la komitaton. La estraro restas senŝanĝa.

Venonta kunsido: 19-an de septembro je la 14.30 en Paris.

Ĉiujare, la 1-an dimanĉon de junio, en Nancy (Le Cénacle) okazos spiritaj ekzercoj. Ĉiuj estas bonvenaj.

Protokolis: G. Preux.

EL LETERO EL ĈINIO

... mi volas rakonti al vi iom pri la kristana aktivado en Shanghai. Diservoj estis ĉesigitaj dum ĉirkaŭ 20 jaroj. En oktobro 1980, la unuaj tri preĝejoj estis malfermitaj. Laŭ onidiro, pliaj preĝejoj malfermiĝos ĉijare. La preĝejoj okazigas du diservojn ĉiudimanĉe. Antaŭ la malfermiĝo de la preĝejoj, oni antaŭkalkulis, ke venos nur gemaljunuloj. Sed fakte pli kaj pli da gejunuloj vizitas la preĝejojn, kaj nuntempe preskaŭ duono de la ĉeestantoj apartenas al la juna generacio. Aŭskultinte la valorajn neniam antaŭe aŭditajn instruojn de Jesuo Kristo, oni volas siajn konatojn venigi por dividi kun ili la ĝojon esti kristano.

La preĝejoj, kiuj ĝenerale povas enteni ĉirkaŭ 1600 personojn, estas ĉiam plenplenaj, tiel ke oni devas malfermi apudajn ĉambrojn kun etenditaj elektraĵfadenoj por akcepti pliajn centojn da adorantoj. Eksterlandaj kristam-turistoj, kiuj vizitas niajn preĝejojn, emociiĝas ĝislarme, kiam ili vidas la ardan kaj pian atmosferon tiean.

Pandiŝo.

NIA MEMBRARO

Novaj anoj: 3) Père Missionnaire du Sacré-Coeur (B-du-R); 4) S-ro MEGIE (L-A); 5) S-ro PACCOUD (Moselle); 6) S-ro DEGOUL (Seine-St-Denis); 6) S-ro NOCQ (S-M) Bonfaraj membroj: 4) F-ino ESPRIT (Hte-M); 5) F-ino MARTIN (A-M); 6) D-ro MERCAT (L & C)

Bonvenon kaj plej koran dankon al ĉiuj!

RAPORTO PRI LA GENERALA KUNVENO EN NANCY

Post bonvenaj vortoj de P. Degrelle, S-ro Despiney legas senkulpigajn leterojn de S-ro Crochet el Epernay, F-to Marmou, S-ro Amouroux kaj F-ino Vanneau. S-ro Colas dankas al niaj gastigantinoj en ĉi tiu domo, gratulas pro la regula aperado de la bulteno kaj la sendado de artikoloj al la gazetato. Rilate al IKUE: "Ni ne forgesu, li diras, ke nia agado celas la pacon de Kristo. Ni celas ankaŭ la kristanajn mediojn sur la ekumena tereno." Li bedaŭras, ke ni ne povas kalkuli inter ni multajn gejunulojn, kiuj konsentus surprizi la taskojn...

Post la financa raporto, S-ino Vincent rimarkigas, ka multaj homoj ankoraŭ ne pagis la kotizon. Tio ege bremsas nian agadon, ĉefe ĉar ni devas pli pagi por la presaĵoj, repagi la vojaĝ-kaj restad-kostojn de P. Bourdon, kiu diservos en Orléans ĉe la landa kongreso. P. Degrelle petas, ke oni kalkulu kiel parton de la spezoj la duonon de la vojaĝkostoj, kiujn la komitatanoj pagas mem por veni al la kunsidoj. Tio estus pli ĝusta kalkulado, ĉar vere temas pri donacoj.

Bulteno: S-ro Villeneuve konsentas sendi raporton pri la aŭskultado de Radio Vatikana al P. Degrelle, kiu pretigos komunan raporton aperontan en nia bulteno. La "lingva angulo" estas interesplena paĝo, kvankam ne tro multaj homoj partoprenas. La redaktorino petas, ke pli da homoj sendu artikoletojn, eĉ eltiritajn el nia kutima korespondado.

Kongreso FKEA 1983: S-ino Vincent proponas abatejon en Mortain, S-ro Pons jam proponis Blois. Fine ni unuanime elektas Lourdes, kie P. Bourdon jam preparis la aferon, esperante, ke venos pli da alilandanoj. Tiu kongreso okazos dum la semajno post Pasko.

Espero Katolika: laŭ iuj iom teda, ĉar la artikoloj estas kutime verkita de la sama homo. Kelkaj trovas plezuron tralegi ĝin. Tamen temas pri pli grava afero: en Romo oni decidas pri ĉio ne atentante la dezirojn kaj proponojn de la alilandanoj, eĉ la decidojn de la tuta IKUE-komitato. Ni pritraktos tiun aferon en Lille.

Ni atente aŭskultas la proponojn de S-roj Ribot kaj Pierru, kun kiuj ni teorie konsentas. Sed jam ne plu funkcias en la Eklezio laŭ aŭtoritata maniero. Oni devas atenti tion, kiam temas pri modernaj aferoj, kiel Esperanto. Tamen ni rimarkigas, ke oni devas proponi Esperanton en niaj diversaj internaciaj kristanaj movadoj, kiel interkomunikilon pli valoran ol aliaj lingvoj. Ni pruvu tion per nia agado!

P. Bourdon konsentas diservi en Orléans. Iu proponas, ke oni organizu monokolekton ĉe la diversaj mesoj, cele repagi almenaŭ parton de liaj elspezoj.

La profito de nia kongreseto estos konservita de la loka komitato por pago de la diversaj kromaj elspezoj.

ww

SPIRITAJ EKZERCOJ ĈIUJARAJ EN NANCIO

Nia nunjara FKEA-kongreso unuanime decidis, post interkonsento kun la monaĥinoj en "Le Cénacle", kiuj tiel afable akceptis nin, ke ĉiujare en Nancio la unuan semajnfino de junio okazos SPIRITAJ EKZERCOJ INTERNACIAJ EN ESPERANTO.

Tio gravas pro pluraj kialoj:

1. En okcidento, kiel jam delonge en Orienta Eŭropo, okazos Spiritaj Ekzercoj Internaciaj por Esperantistoj: ni internacie pripensas nian kredon, nian esperon, nian amon; internacie ni preĝos, diservos, iros al Dio per Jesuo en la Sankta Spirito; internacie ni uzos nian kantikaron, ni kantos psalmaron.
2. Regultakte estos anoncite, ke en Nancio Esperantistoj Kristanaj uzas Esperanton por diskuti, preĝi, decidi, legi la Sanktan Biblion; regultakte ni havos eblecon pruvii al la aliaj homoj en la domo de la Spiritaj Ekzercoj, ke Esperanto estas taŭga kaj vivanta lingvo de vivanta kristanaro.
3. Nancio estas sufiĉe proksima al Nederlando, Luksemburgio, Belgio, Germanio Svislando, Norda Italio, por ke ĉiujfoje, almenaŭ espereble, tiuj Spiritaj Ekzercoj ricevu internacian karakteron.

Dependas de ni ĉiuj, ke tiu unuanima kaj entuziasma decido iĝu realaĵo.

Anoncu kaj anoncigu en viaj bultenoj, ke ekde 1983, ĉiujare, ĉiun unuan dimanĉon de junio, estos grava kunveno en Nancio. La kongreso decidis, ke ĉiu FKEA-ano partoprenu en la realigo de la decido.

Adreso de la prizorganto de la Spiritaj Ekzercoj: P. Roger DEGRELLE

B.P. 23

54510 TOMBLAINE

ESPERANTO EN LA RADIO (sendis G. Villeneuve)

N.B. De marto, Radio Polonia denove elsendis en Esperanto, bedaŭrinde, de la komenco de majo, ŝajnas ne plu elsendi. Mi substrekis la ondolongojn kaj frekvencojn, kiujn mi facile kaptas, tamen provu la aliajn. La indikitaj horoj estas la francaj.

Ĉiutage: 22-22.30 - Pekino 19,80 - 26,20 - 30,10 m
15150 11445 9965 khz
0,30-1.00 - Pekino 19,78 - 26,00 m
15165 11515 khz

Dimanĉe: 7.45 - 7.57 - Vieno 48,74 - 30,71 - 16,91 m
6155 9770 17745 khz

21.05-21.15 - Vatikano 196 - 48,47 - 48,31 - 41,38 - 31,17 - 31,10 -
1530 6190 6210 7250 9625 9645
25,65 - 19,84 m
11700 15120 khz

Lunde: 20.00-20.10 - Berno 75,28 - 48,66 - 31,46 m
3985 6165 9535
22.30-22.40 Berno same

19.20-19.25 nur por Lille-regiono "Expression Nord" 94,7 mhz FM la 3-an
lundon de ĉiu monato

Ĝaŭde: 7.10-7.25 - Vatikano 48,47 - 31,10 m
6190 9645 khz

20.00-20.10; 22.30-22.40 - Berno kiel lunde

Sabate: 18.45-18.57 - Vieno 48,74 - 30,71 - 19,28 m
6155 9770 15560 khz

20.00-20.10; 22.30-22.40 - Berno kiel lunde

22.00-22.20 - Romo 41,24 - 30,90 - 25,42 m
7275 9710 11800

Skribu al ĉiuj radiostacioj por ke Esperanto aŭdiĝu sur la ondoj; vidu la adresojn sur p. 10 en N^o 132 de FKE.

*

ALVOKAS RADIO VATIKANA

Nia nunjara FKEA-kongreso unuanime decidis, ke ni subtenu kune kaj individu multe pli nian katolikan Esperanto-radion. S-ro Villeneuve, fidela aŭskultanto, regule raportos kaj instigos al reago. Dankon al li.

P. Degrelle, kiu regule skribas al Radio Vatikana, invitas vin al amasa skribado. Gratulon al li. Ĉu necesas aldoni, ka ambaŭ kaj aŭskultas kaj skribas? Kial do nia kongreso uzis tempon por Vatikana radio? Ĉar laŭ ĉiuj partoprenantoj, Radio Vatikana estas la agnosko de nia Internacia Lingvo fare de la oficialaj instancoj de la Katolika Eklezio. Bedaŭrinde, ke ĝis nun ka Papo ne salutis en Esperanto okaze de Pasko aŭ Kristnasko. Sed multe pli gravas, ke ĉiudimanĉe kaj ĉiŝaŭde la Papa Radio elsendas en Esperanto, kio ne okazas por la multnombraj lingvoj uzitaj de la Papo por Pask- kaj Kristnask-salutoj!

La ĉijara FKEA-kongreso alvokas ĉiujn el ni kaj aŭskulti Radion Vatikanan kaj skribi, kial ne ĉiusemajne? al ĝi por saluti, subteni kaj montri la gravecon de tiu elsendado en Esperanto.

Ĉiu al sia plumo por skribi. Ĉiu al sia radioaparato por aŭskulti.

La N.N.K. (Nacia Nancia Kongreso)

xx

PROGRAMO DE LA 39-a IKUE-KONGRESO EN LILLE 17/23-an de JULIO 1982

Generala temo: LA PACO

Sabaton 17-an: 15.00-18.00: akcepto de la kongresanoj
19.00: vespermanĝo - 20.00: interkona vespero

Dimanĉon 18-an: 9.00: unua prelego "PACO KAJ HOMAJ RAJTOJ"
posttagmeze: solena meso en preĝejo "St-Sauveur" kun prediko de S-ino Jelly KOOPMANS-SCHOTANUS

.../...

- P. Bernard EICKORN preparas kaj estros la tutan liturgion de la kongreso
 20.00: distra vespero
- Lundon 19-an: 9.00: PACO KAJ VIRINO (S-ino KOOPMANS) - diversaj kunvenoj
 11.30: diservo -
 posttagmeze: kunveno de IKUE-komitato - ĝenerala kunveno (art. 15)
- Mardon 20-an: 9.00: PACO KAJ MALARMADO (P. Degrelle)
 11.30: diservo
 15.00: ĝenerala kunveno IKUE
- Merkredon 21-an: tuttaga ekskurso al la Flandraj montoj
- Ĝaŭdon 22-an: 9.00: PACO KAJ SENPERFORTO
 11.30: diservo
 15.00: 2-a komitatkunveno
 20.00: solena fermo - decidoj-kaj konkludoj
- Vendredon 23-an: 8.00: diservo
 9.00: matenmanĝo kaj adiaŭoj

Respondeculo: P. Bourdon 7, av. Salomon 59800 LILLE
 xxx

Informbukedo

1. Kiu volas doni sian voĉon por registri la bultenon por blindaj membroj?
2. Pere de esperantaj korespondantoj ĝemeliĝis du paroŝoj: "Chorzow" Pollando 41500 (S-ta Antonio) kaj "Nantes" 44000 (St-Pasquier)
3. La hispana reĝo Juan Carlos I transprenis la prezidantecon de la Honora Komitato de la Internacia Sporta Seminario, kiu okazos en Madrido de la 8-a ĝis la 11-a de julio 1982, kunlige kun la Mondaj Futbalaj Championludoj, kaj kies sola laborlingvo estos Esperanto. Post la seminario la partoprenantoj povos ĉeesti kelktagan programon en Sevilio kaj la Hispanan Esperanto-Kongreson en Malago.
 Inf: Madruda Esperanto-Liceo, Sporta Seminario, Atocha 98, 4º Madrid 12 Hisp.
4. F-ino E. Worsztynowicz, studentino pri libroscienco en la universitato de Poznan, preparas sian licencian disertacion pri "Esperantaj bibliotekoj en la mondo". Ŝi volonte ekligos kontaktojn kun bibliotekistoj kaj serĉas ilformojn pri esperantaj bibliotekoj, katalogojn kaj bibliografiojn. Adreso: ul. Pozmanska 26 m 37 63-100 SREM POLLANDO
5. 1-a Internacia Familia Feriado "Esperanto hejme" en Miedzygorze Pollando, de la 15-a ĝis la 28-a de aŭgusto 1982 en Sudety-montaro. Por esperantistaj familioj, lernantoj de mezlernejoj, studentoj instruistoj. Varia programo. Partoprenkotizo: 450 guldenoj aŭ egelvaloro.
 Inf: Pola Esperanto-Asocio P.O. Kesto 16 50-952 WROCLAW 17 POLLANDO.
6. 18-a "Ora Pola Aŭtuno" en Miedzygorze Pollando, de la 30/8 ĝis la 12/9/82. Varia programo. Partoprenkotizo: 450 gld. Informoj kiel ĉi supre.

xx

RADIO ROMA - ESPERANTO

RESTAURITA FRESKO teksto de Cappellani, trad. de De Salvo

En Florenco, post pli ol 15 jaroj, ĵus estis ree malfermita al la publiko la Vespermanĝejo de Andrea del Sarto, kiun oni taksas preskaŭ tiel bela kiel tiu pentrita de Leonardo da Vinci.

La fresko, pentrita inter 1511 kaj 1526, nun estas akompanata de aliaj verkoj, tiel de A. del Sarto kiel de aliaj pentristoj, ĉefe frurenensancaj. Ĉeestas ankaŭ pluraj pentraĵoj, parte restaŭrotaj, venantaj el monaĥejoj fermitaj dum la napoleono epoko.

La akompanataj verkoj gastas en la magazenoj de kelkaj florencaj muzeoj, ĉefe de "Uffizi"; pro tio, la remalfermo de la "Vespermanĝejo" enkadriĝas en la celebrado de la plurjarcenta datreveno de la mondkonata galerio.

La monaĥejo "San Salvi", kie troviĝas la fresko de A. del Sarto, estis inundita en 1966, kiam la akvo de la rivero Arno preskaŭ atingis la freskon. La restaŭraj laboroj ĝis nun faritaj kostis preskaŭ unu miliardon da liroj.

* 0 *

SANKTIGO DE PATRO KOLBE teksto, de Milana, trad. de De Salvo

La 10-an de venonta oktobro, Papo Johano Paŭlo II-a proklamos sanktulo Patron Maksimilianon Kolbe, mortigitan de Nazioj la 14/8/1941 en la koncentrejo Auschwitz/Oswiecim, anstataŭ iu pola viro. La ceremonio okazos en Romo (en S-ta

Petro), dum, en la komenco, oni planis efektiviĝi ĝin en Pollando, en la koncentrejo mem.

La sanktigo de Patro Kolbe (por kiu pledis ĉefe lia monaĥa ordeno, tiude la minoraj monaĥejaj fratoj, apartenantaj al la franciskana familio) havos lkon kvankam la kanonjura kodo preskribas la neceson de novaj mirakloj krom tiuj jam dokumentitaj por la beatigo. Patro Kolbe estos sanktigita kiel "kredoatestant" e kiel "martiro", ĉar lia morto ne okazis pro religiaj kaŭzoj.

+++++

LA HOMA VIVO

Kiam Dio kreis la bestojn kaj la Homon, Li aldestinis al ĉiu el ili la saman vivdaŭron: po 20 jaroj. Senescepte pri grandeco kaj saĝeco. Venis antaŭ Lia trono la Homo kaj ekplendis: "La mondo estas tiel bela, la plezurpovo tiel multaj, dum la vivdaŭro tiel mallonga.. Ne sufiĉas por mi 20 jaroj de vivado! Kompatu do kaj aldonu!.." Diris la azeno: "Ho, ~~ĝi~~ kompatema Mondkreinto! Vidu mian vivdestinon: Ĝi estas plenplena de batoj kaj ŝarĝoportado.. Estas por mi tro multe suferi 20 jarojn. Sufiĉas por mi eĉ duono: la ceteron donu al la Homo! "Venis la ĉevalo kaj ploris: "Ĉu mia vivo estas vivo? Sola mizerstato! Sufiĉas por mi 15 jaroj: la ceteron mi donacas por la Homo!" La samon diris aliaj bestoj kiel Kato, Hundo, Leporo, Porko kaj Simio. Ili ĉiuj donacis parton de sia vivlongeco al la Homo. Kaj la bona Dio prenis la elektran kalkulilon, aŭskultis, notis kaj alkalkulis. Rezulte ili ricevis mallongigitan vivdaŭron, dum al la Homo Li aldestinis 120 vivjarojn.

Sed ... homece li vivas nur dum siaj propraj 20 jaroj: li amuziĝas, ĝojas, kantas, ludas, promenas kaj plenigas ilin per plezuroj. Kaj poste... ho, poste li vivas bestmaniere: li portas la vivŝarĝon kiel Azeno, laboregas kiel Ĉevalo, ŝvitas kiel Mulo. Li timtremas kiel Leporo, ĉasas plezurmomantojn kiel Kato, obeas la sorton kiel Hundo, malsatas kiel Lupo, manĝegas kiel Porko kaj formortas kiel Simio....

Memoru la moralon de la fabelo kaj penu vivi homece kiel eble plej longe!

Verkis D-ro K.C., trad. F. Musil

+++++

KOTIZTABELO 1982

IKUE kun "Espero Katolika" 60 F
Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

* * * *

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" 20 F
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj 10 F
Bonfaranto 100 F
Dumviva membro 400 F

UFE kun "Revue Française" 125 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro 135 F

Abono al "Biblia Revuo" 36 F
Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

+++++

N°133- bulletin trimestriiel - trimonata bulteno - junio 1982 -

ENHAVO : Bileto de la Prezidando, R.Cl.Colas - paĝoj 1-2-

Tia estas nia kredo, Michel Lelong -2-; IKUE-membroj en Francujo, Roger Degrelle; Lingva angulo : 3; Al la perfektigenujoj, pova propono : 3; Protokolo de la komitatkunveno 14a de Marto, G. Preux : 4; EL letero el ĉinio, Pandiŝo : 4; nia membraro : 4; Raporto pri ĝenerala kunveno en Nancy : 5; Spiritaj ekzercoj ĉiujaraj en Nancio, R. Degrelle, 5; Esperanto en radio, G. Villeneuve : 6; Alveka Radio Vatikana, NNK : 6; Programo de la 39a IKUE-kongreso en Lille : 6-7; Radio Rama, 7; La homa vivo: 8; Kotiz- 8.

+++++

Dépôt légal: 2ème trimestre 1982 !! Polycopié par F. M. C.
C. P. P. n° 62 532 !! Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brè
Directeur-gérant: Roger Despiney !! 77610 FONTENAY TRESIGNY FRANCE